


# Boletín

DE LA FEDERACION ESPERANTISTA ESPANOLA



Valladolid.— Kolonoj en Sankta Gregorio. (Nacia Muzeo pri Skulptarto).

---

*Nur por viziti tiun belegan ĉefverkon de la Kastilia arkitekturo, valoras la penon entrepreni laveturadon al Valladolid.*

---

**BOLETIN**

DE LA

FEDERACION ESPAÑOLA DE ESPERANTO

Redaktoro: S-ro Angel Pérez Saura

Kotizoj de la Federacio por ricevi BOLETIN

Membro abonanto: 60 pesetojn jare

Membro subtenanto: 120 pesetojn jare.

Ĉi tiuj membroj ricevas da ekzemplerojn  
se ili tion deziras.

Eksterlandaj abonoj: Minimume, 60 pesetojn jare.

Kolektivaj membroj: 6 pesetojn jare.

La grupo ricevas po unu ekzemplero por ĉiu deko  
de tiuj membroj.Korespondaj anoncoj: 10 pesetojn aŭ da  
respondkuponojn ĉiu 20 vortoj aŭ frakcio.  
Pri aliaj anoncoj, bonvolu peti informojn.

Antaŭ ol sendi leteron rimarku ke:

Oficialaj aferoj devas esti adresataj al:

**Federación Española de Esperanto**

Str. Marqués de Caro, 6, Valencia (Hispanujo)

Originalojn, solvojn de enigmoj, sugestojn por **Bo-**  
**letin**, k. t. p., adresu al:S-ro Angel Pérez Saura (por **Boletín**)

Str. V. Sancho-Tello, 24, b. d., Valencia (Hispan.)

Monsendojn adresu nepre al:

S-ro Ernesto Guillem Tarín

Str. Marqués de Caro, 6, Valencia (Hispanujo)

(Klarigante la destino de la sendita mono: por  
HEF, por **Libroservo**, por **Boletín**, por io alia).

Kaj sendaĵojn pri statistiko kaj informado sendu al:

S-ro Salvador Aragay (HEF-informoficejo)

Str. Arce, 8, 2.<sup>o</sup>, 4.<sup>o</sup>, Cornellá (Barcelona) (Hispan.)Tiamaniere vi helpas al la POŝTOFICEJOJ, al  
ni, kaj al vi mem.**Hispana Esperanto Federacio****INFORMOFICEJO**Arce, 8, 2.<sup>o</sup> 4.<sup>o</sup> - CORNELIA (Barcelona)  
HISPANUJO

Karaj gesamiceanoj:

Sub la aŭspicio de H. E. F. la INFOR-  
MOFICEJO starigos komisionon por efike  
progresigi nian aferon tra la tuta lando.Tiucele, ni publikigos almenaŭ trimo-  
natan buletenon kun novaĵoj pri nia mova-  
do. La laboro de niaj kunlaborantoj estos  
enkonduki ilin, ĉu parte, ĉu tute, en la di-  
versajn lokajn jurnalajn kaj radiostaciojn;  
(se necese, la samaj kunlaborantoj povos  
subskribi la notojn aŭ artikoletojn).Ni plezure ricevos taŭgajn artikolojn de  
niaj kunlaborantoj kaj ni provos publikigi  
ilin en konvenaj jurnalaj aŭ revuaj.Aŭkaŭ ni intencas plani gravan kaj tra-  
fan kampanjon tra la diversaj publikaĵoj en  
kiuj aperas la sekcio «Leteroj al la Direk-  
toro» aŭ similaĵo.Ni bezonas vian helpon kaj ni estas cer-  
taj ke vi ne rifuzos ĝin al ni. Se ni agos  
racie, ni ege sukcesos.Kopiu kaj plenumu la kuametitajn res-  
pondilon kaj tuj resendu ĝin al ni.**EK AL LA LABORO KAJ AL LA  
SUKCESO!**

Koran antaŭdankon kaj saluton.

Direktoro,  
**S. Aragay**Sekretario,  
**R. Molera***S-no aŭ S-ino* .....

Adreso .....

Urbo .....

Provinco .....

*Akceptas esti Delegit(in)o de nia INFORMOFICEJO kaj plenumi la ko cernajn devojn.**Mi havas eblecon enkonduki artikoletojn aŭ novaĵojn pri la Esperanta movado en la ju-  
rnalojn kaj radiostaciojn (citu la nomojn kaj titolojn):* .....*Mi regule legas la jenajn jurnalajn aŭ revuojn en kiuj aperas la sekcio «Leteroj al la Di-  
rektor» aŭ similaĵo. Tiamaniere, mi povos kontroli la aperadon de iu ajn letero pri nia afero:*

Dato kaj subskribo.

# OPERACIONES DE TESORERIA DE 1961

## COBROS

Superávit del año 1960.....		6,918 <sup>00</sup> —	Pesetas
Cuotas .....	48.632 <sup>00</sup> —		
Donativos .....	5.832 <sup>00</sup> —		
Venta material propaganda .....	1.907 <sup>00</sup> —		
Superávit Congreso de Palma .....	2.235 <sup>00</sup> —		
»        »        » IFEF, Barcelona .....	500 <sup>00</sup> —		
Intereses en cuenta de ahorros .....	266 <sup>00</sup> —	59.372 <sup>00</sup> —	66.290 <sup>00</sup> —

## PAGOS

BOLETIN :	{	Composición e impresión .....	27.265 <sup>00</sup> —	
		Fotografados .....	2.785 <sup>00</sup> —	
		Sobres .....	1.935 <sup>00</sup> —	
		Correo .....	4.461 <sup>00</sup> —	36.446 <sup>00</sup> —
Sekretario-helpanto .....		6.000 <sup>00</sup> —		
Impresos .....		3.025 <sup>00</sup> —		
Material sobrante Congreso Palma .....		2.590 <sup>00</sup> —		
Cuota de U. E. A. en 1961 .....		1.680 <sup>00</sup> —		
Alquiler archivo y secretaria .....		1.200 <sup>00</sup> —		
Gastos varios y menores .....		707 <sup>00</sup> —		
Renovar direcciones máquina .....		443 <sup>00</sup> —		
Corona flores a LUIS HERNANDEZ .....		350 <sup>00</sup> —	52.441 <sup>00</sup> —	
<b>SUPERAVIT FINAL, PESETAS</b>			<b>13.849<sup>00</sup> —</b>	

Valencia, a 31 Diciembre de 1961  
El Tesorero, J. Ernesto Guillem

## COMENTARIO

Creemos que es buena costumbre analizar las partidas de cobros y pagos, comparándolas con las del año anterior. El milagro de las cuotas mayores con menor número de socios, se debe a las aportaciones de nuestros GRUPOS por sus socios no adheridos a HEF, a razón de 6 ptas. al año. Los donativos, felizmente, han sido también mayores. Lamentamos que por no tener el resultado de las ventas de libros, no hemos podido incluir nada, pero en cambio, los diligentes administradores de los Congresos de 1961 en España, el Nacional en Palma de Mallorca y el Internacional de IFEF en Barcelona, han aportado una parte de sus superávits para HEF, que los acepta con agradecimiento. Sobre los pagos, lamentamos la continua e irremediable subida de todo lo referente al *Bole-*

*tin*, pero en los demás nos hemos mantenido con una cifra semejante. En los impresos están incluidos los nuevos Reglamentos repartidos a todos nuestros asociados y los MEMBROKARTOS remanentes para los nuevos. Finalmente, el superávit alcanzado podrá servir para el pago de una tirada doble de un número de *Boletín*, casi todo castellano, para que sirva de PROPAGANDA y poderlo enviar a los simpatizantes al objeto de atraerlos a nuestras filas. También está en nuestro ánimo imprimir de nuevo la ADRESARO de todos nuestros actuales socios, pues, desde 1957, en que se publicó, hay muchísimos nuevos socios y otros con diferente domicilio, aparte de que está hace mucho tiempo agotada dicha edición, y creemos que será un estímulo, para muchos, saber que hay amigos esperantistas por todas partes, y cada Grupo con sus socios, algunos muy numerosos.

# Klariona de Esperanta

En ĉi tiu jaro, preskaŭ ĵus komencita, estas Kastilio, bela kaj antikva hispana regiono, kaj estas Valladolid, historia urbo, kiuj lanĉas sian atentigan alvokon por anonci, per la kvar ventoj, al hispanoj kaj alilandanoj, ke en la kastila ebenaltaĵo, la tero de ĉi tiu nobela urbo, koro de la regiono, estos la plej taŭga ejo por ricevi en sia glora Universitato ĉiujn, kiuj partoprenos nian 23-an Nacian Kongreson de Esperanto.

La Nacia Federacio havis bonan trafon elektante ĉi tiun grandan urbon, kiu estas banita—neniam pli bone dirita vorto post tiuj ĵus okazintaj inundoj—de la rivero Pisuega; antikva hispana Kortego, lulilo de famaj reĝoj kaj de gloraj viroj, loĝejo de la nobelaro, cent pro centa historia urbo, kaj, antaŭ ĉio, klera kaj studema.

Ĝi ricevos gentile ĉiujn geesperantistojn, ne gravas de kie ili venos. De antaŭ longe, ĝi estas gastema urbo kaj, pliafoje, ĝi ricevos vin kun grandbelvestaj honoroj, kiam vi venos el malproksimaj lokoj, nur por montri kaj komprenigi al aliaj la utilcon kaj avantaĝojn de la internacia idiom, kio certe okazos en la aŭloj de nia malnova kaj tradicia Universitato, kiu estas honoro de la tuta Kastilio.

Vin ĉiujn, kiuj estas ŝirmataj de nia verda-blanka espera flago kaj kiuj estas gvidataj de la verda kvinpunta stelo, Valladolid atendas kaj ricevos per malfermi-

taj brakoj. La tuta urbo, reprezentata de la ĉefaj aŭtoritatoj, kore ricevos vin: tion ili promesis, kaj, mi estas certa, tion ili plenumos.

Tie ĉi, la amantoj de la historio trovos plej grandan plezuron kiam ili vizitos la historiajn kastelojn, monahinejojn, majestajn loĝejojn, muzeojn kaj monumentojn; la Universitaton kaj la romanidartajn preĝejojn, inter kiuj estas tiu nomata «regino de la romanidaj turoj de Kastilio». Resume, vi povos admiri veran riĉaĵon el historio kaj arto.

Nur ses kilometrojn malproksime de nia urbo, vi trovos belan sportan kampadon, ĉe la rivero Pisuega, plene fukciantan, kie ekzistas rafinitaj servoj, artefarita plaĝo kaj verda razeno sub densaj branĉaroj de belaj arboj.

Senpene, vi povos realigi, intertempe, kelkajn ekskursojn tra historiaj lokoj, tra belaj pejzaĝoj, ĉar la kastila ebenajo ankaŭ scias oferi tion, kiam la tritikplantejoj sangas sian verdan koloron kontraŭ tiu ora de la pano.

Mi estas certa, ke, kiam vi konos la valladolidan urbon, vi gardos neforgeseblan memoron pri via restado en ĝi.

Do, ĉiuj, kiuj aspiras al la gloron por nia internacia idiom, ne devas manki al la rendevuo.

**VALLADOLID ATENDAS VIN!!!**

*Valladolidano*

## XXIII CONGRESO...

Nuestros congresos nacionales, celebrados anualmente en distintas ciudades de nuestro país, son la manifestación más importante del Esperanto en España. La organización de estos congresos requiere un gran entusiasmo, trabajo agotador de unas pocas personas —a veces una sola—, requiere un desembolso económico de cierta consideración para las posibilidades de los esperantistas, que al fin y al cabo son los que costean los gastos de los mismos, y supone un cúmulo de ilusiones y esperanzas en cuanto a los resultados.

Valladolid ha cargado, este año, con la responsabilidad de organizar el XXIII Congreso. Hasta la fecha, los vallisoletanos, encabezados por nuestro amigo y samideano Cantalapiedra, han realizado su parte con creces, pero esas ausencias destacadas de ciertos grupos que se han notado otros años parece se van a repetir. ¿Qué hacen esos grupos que no organizan su autocar correspondiente? o ¿es que lo están haciendo ya en secreto?

# EFIKO AŬ MALEFIKO?

Unu el la plej efikaj rimedoj por nia lingvo estas lernigado—ĝin konigi kaj sciigi. Sed ni spertis ke iu kiu iam lernis Esperanton kaj poste ĝin forgesis, maleme sintenas al nia lingvo; li restas iel imunita. Li, simple memoras ke li, iam, *estis* esperantisto, kiel tiu kiu, iam, *estis* ĉu filatelisto, ĉu ludisto pri ŝako, aŭ studemulo pri io ajn, kion *ne plu* intereas lin, aŭ pri kio li *malvarmigis*.

Estas pli facile intereson aŭ sciemon vekti pri *novaĵo* ol pri io kion oni jam sciis kaj ne fariĝis daŭra, pri io kio velkiĝis, mortis, forpasis. Kaj tre ofte ĉi-tio okazas al Esperanto, kiam oni ĝin lernigis al knabo, al kiu, poste, devigaj studoj, lernejoj, universitataj temaroj, forprenas la tutan tempon kaj atenton, kaj la lerninto de Esperanto ne plu aŭ tute neniam ĝin utiligis post lerno. Mi ne dubas pri esceptoj al tiu regulo, sed nun ne temas pri esceptoj.

Tial, dum Esperanto ne trudiĝos kiel utila, necesa aŭ deviga post eklerno; dum aperos, probable, ĝin forgesi estas konsilinda

de ĝian lernigon prokrasti kaj, anstataŭe, ĝin efektiviĝi al gefraŭloj aŭ gesinjoroj, kiuj, pli versaĵne, povos aboni Esperantan gazeton, interŝanĝi daŭran korespondadon, legi librojn, ĉeesti kongresojn, k. t. p. en Esperanto. Pri Esperanto en lernejon, ni devas preferi ke ĝi estu instruata en la lastaj lernjaroj, kaj precipe ĉe mezaj kaj superaj lernejoj. Estas tre dube ke knabo lerninta Esperanton kiam li estas, ekzemple, 13-jara, se li ne plu *devos* ĝin praktikadi, li ĝin ne forgesos; kaj estonte, li simple memoros ke tiu scio apartenas al 13-jaraĝo, al estiateco. Nia mondo ne estas ankoraŭ tiel esperantigita ke tia knabo, kies volo preskaŭ ne ekzistas, kiu ankaŭ ne povas ankoraŭ konscii pri la interna ideo de Esperanto, kiu lin stimulas, ne forgesos la internacian lingvon antaŭ ol li estos memstara homo en la socio.

Kaj nia propagando devas eviti la impreson ke Esperanto estas io, kion oni lernas por forgeso.

*Delfi Dalmau*

---

## FORTALECIMIENTO DE LAS RELACIONES DE UEA CON LA UNESCO

Según el informe recibido recientemente, el Comité Ejecutivo de la UNESCO decidió durante su última sesión incluir a UEA en la categoría de «Información y Relaciones Consultivas» (categoría B), según las nuevas directrices concernientes a las relaciones de UNESCO con las organizaciones internacionales no estatales.

Las organizaciones de categoría A (formados por la misma UNESCO) y B (las más importantes organizaciones privadas internacionales) gozan de considera-

bles ventajas en comparación con las organizaciones de categoría C (organizaciones internacionales menos importantes en Relaciones Consultivas con UNESCO) y las demás organizaciones, fuera de cualquier categoría, con las cuales UNESCO puede tener relaciones no formalizadas. La nueva posición es el resultado de una colaboración eficaz de UEA con UNESCO y prometedora de una mayor colaboración y fortalecimiento de la posición de UEA en el mundo.

# HISPANA KRONIKO

## Moyá (Barcelona)

### INTERESA PRELEGO

La 28-an de decembro, vespere, okazis ĉe la Publika Biblioteko de la loka Ŝparkaso, prelego de japana samidano, S-ro Yutuka Waseda, El Nagoya. La elstara preleganto, tre bonstila, rakontis pri sia lando kaj, tre trafe, klarigis la belajn kolorajn diapozitivojn pri Japanujo, kiujn li prezentis.

La ĉefaj japanaj urboj, la naciaj kaj folkloraj kostumoj, kaj la kuriozaj sportoj kaj kutimoj de la japana popolo, tre elegante pasis antaŭ la okuloj de la ĉeestantaro.

Ĉeestis granda popolamaso—la tuta vilaĝo—, kaj la preleganto ricevis tre meritatajn aplaŭdojn.

Oni tradukis al la kataluna lingvo—por la ne esperantista publiko—la koncernajn klarigojn.

### ZAMENHOF-FESTO

Ĝi okazis ĉe ESPERANTO-GRUPO MOYÁ, la 23-an de la monato decembro.

Familie kunvenis la 40 gemembroj de la Grupo kaj oni prezentis Kristnaskan muzikon el diversaj landoj, belajn diapozitivojn pri diversaj hispanaj urboj, kaj S-ro Molera prelegetis pri la VIVO KAJ AGADO de D-ro ZAMENHOF.

En la sidejo oni instalas ekspozicion pri la landoj: DANUJO, SVEDUJO, NORVEGUJO, FINLANDO kaj ISLANDO, pere de turisma materialo ricevita de la Turismoficejoj de la koncernaj landoj.

La vespero estis sufiĉe gaja.

## VIVO SAMIDEANA

La 15-an de Januaro naskiĝis infano Roger Mimó Lladós, dua filo de gesamideanoj L. Mimó kaj Teresa Lladós, ambaŭ elstaraj lokaj esperantistoj. La alia filo,

Albert, 15-jara, estas, ankaŭ, bona esperantisto.

Gratulon al la modela esperantista familio kaj ni esperos ke la nova alveninto fariĝos ankaŭ rimarkinda samideano.

## 17-a Universala Kongreso de Esperanto

Kopenhago, 4-11 Aŭgusto 1962

Sub la Alta Protektado de la Danio  
Ĉefministro Viggo Kampmann.

Konstanta Adreso: ĉe U.E.A.,  
Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam  
2, Nederlando.

### Novaj Kotizoj

Post la 31-a de marto validos jenaj kotizoj:

- Kongresano  
ned. gld. 51,50 (d. kr. 98,00)
- Edz(in)o de kongresano  
ned. gld. 25,75 (d. kr. 49,00)
- Junul(in)o ne pli ol 20 jara  
ned. gld. 19,50 (d. kr. 36,75)
- Studento de 20 ĝis 30 jara  
ned. gld. 32,50 (d. kr. 62,25)
- Blindulo kaj ties gvidanto po  
ned. gld. 25,75 (d. kr. 49,00)

### Glumarkoj

La koloraj kongresaj glumarkoj kun la kongresa emblemo, valora ornamajo de la leteroj de ĉiuj esperantistoj, estas aĉeteblaj ĉe la Libro-Servo de U.E.A., je prezo de 0,35 ned. gld. (1,40 steloj) por 1 folio aŭ 1,00 ned. gld. (4,00 steloj) por 3 folioj.

DRO L. ZAMENHOF

VARSOVIO

str. Dzika N.º 9

Agrable surprizo

Ne estis hazardo ke ĉiuj kioskoj en Valencio havas belegajn kolorigitajn poŝtkartojn kun ESPERANTO-tekstoj dorsflanke. Nia Kasisto vizitis la eldoniston kaj, jen, venis la surprizo. S-ro Manuel Macián antikva 8-ano, ricevis la apudan p.k-n sendita de D.º Zamenhof, la 24-3-1912, laŭ atestas la poŝta stampo, okaze de lia eldono de verdstela p.k honore al la krcinto de la LINGVO INTERNACIA. La adreso de S-ro Macián estas la sama, Cruz Nueva, 12; tamen, estis epoko dum kin li loĝis en Francio, kaj tial perdis sia kunlaborado kun nia Grupo, sed ĉiam li estis fervorulo, obstina kaj aktiva helpanto, kaj lia ekzemplo estas bona por ni ĉiuj, nome, ĉiam persisti, labori kaj agi, ĝis kiam nia ideo fariĝos realo. Li lernis en nia Universitato, kaj en la sama aŭlo daŭrigas, nun, novaj kursoj. Certe, estas miloj da personoj kiuj lernis nian lingvon kaj restas favoraj al ni, sed, ĉar ili laboras izolite, multaj fortoj perdis. Laŭ

E. S.  
Vian leteron kun la poŝtaj kartoj perdis de vi, mi danke ricevis. Sendi al vi mian fotografon mi bedaŭrinde ne povas, ĉar mi ne havas nun eĉ unu ekzempleron.

Manuel

gentila invito nia, li jam denove apartenas al niaj vicoj. VENU AL NI, LA BRAVULOJ!

DRO. L. ZAMENHOF

Varsovio

Str. Dzika, N.º 9

E. S.

Vian leteron kun la poŝtaj kartoj faritaj de vi, mi danke ricevis.

Sendi al vi mian fotografon mi bedaŭrinde ne povas, ĉar mi ne havas nun eĉ unu ekzempleron.

Via,  
L. Zamenhof

Matasello 25-4-12

Al Sro. Manuel Macián

Cruz Nueva, 14

VALENCIA

Hispania

Espagne

Postobaja Kartoska

BARSABA

IV EKSPEDICIJA

# LA REVO DE AYMONIER

Kuradis la 1.907<sup>a</sup> jaro, Tiam, mi jam estis du jarojn esperantisto. Pli ol unu milo de samideanoj el diversaj nacioj prepariĝis por ĉeesti la III-an Universalan Kongreson en Kambriĝ. En La Revuo, monata gazeto publikita en Parizo, ĝia direktoro, la eminenta esperantisto S-ro Carlo Bourlet skribis interesan artikolon, titolita «Antaŭ la III-a kongreso». S-ro Camille Aymonier, en la sama gazeto, skribis revon, kiun li havis sur la ferdeko de la ŝipo, post la fino de la 1<sup>a</sup> kongreso, ĵus okazinta en Boulogne sur Mer, por reveni en sia hejmo, kaj, inter aliajn, li diris: «Tre certe, kongresoj helpas la akiron de la lingvo, sed, ĉu flanke de tiuj kongresoj ni ne povus havi ian Esperantujon, iun urbeton trankvilan, senbruan, kien dum someraj libertempaj monatoj kunsidu esperantistoj ĉiulandaĵ?» Jam pasis 52 jarojn, kaj, malgraŭ la du fortegaj, teruraj batoj kiuj falis sur Esperanto, pro la du mondmilitoj, ion ni atingis: Kastelon Gresillon. En ĝi, dum la tuta jaro, precipe somere, kunsidas fremdaj gesamideanoj, kiuj estas devigataj paroli Esperanton kaj praktiki nian karan lingvon.

Mi memoras ke la jarlibro de U. E. A. publikis anoncon de samideano kiu oferis sian hejmon por ĉiu esperantisto kiu deziru resti nur unu tagon ĉe li, sen pago de mango kaj lito. Mi ankaŭ publikigus saman anoncon, sed mi kredas ke la

Jarlibro devus publikii tiujn anoncetojn sen pago; estas sufiĉe seninteresa la ofero por konduki al la vojaĝantoj por praktiki lingvon. Dum pasinta Oktobro, germana esperantisto, S-ro Hans Gäbler, vizitis min en mia hejmo, kie li restis, manĝis kaj dormis dum naŭ tagojn. Ni, dum la tuta tempo, estis kune, vizitis urbon, preĝejojn, muzeojn, mulfoje la Esperantistan Grupon, k. t. p. En la Grupejo, S-ro Hans Gäbler parolis kun multaj anoj, komencantoj kiuj deziris praktiki la lingvon kun fremda samideano. Mi ne konas germanan lingvon, kaj S-ro Gäbler ne konas hispanan, kaj ni estis devigataj, vole nevole, paroli Esperanton. Mi konis S-ran Gäbler en la 44<sup>a</sup> U. K. en Varsovio. Estas tre interese por esperantistoj, kiuj povas vojaĝi, ke ili estu akceptataj en la hejmo de la vizititaj samideanoj. Tiamaniere, Esperantujo estus la tuta mondo. Mi memoras ankaŭ ke, post la 43<sup>a</sup> U. K. en Mainz, mi vizitis Bruselon, kie mi feliĉe parolis kun multaj fremdaj esperantistoj. Poste, mi vizitis Parizon, kie mi loĝis en Hotelo Felix, kies posedanto estas S-ro Thierry, delegito de U. E. A. Kaj, fine, mi iris al la Kastelo Gresillon, kaj tie mi parolis kun geesperantistoj el diversaj nacioj. Tio ne nur estas praktiki Esperanton, sed ankaŭ, kulturii amikecon, kaj konsekvence, pliĝi ndiĝi la grandan rondon familian.

VETERANO

U. E. A.

## NOVA ADRESO DE LA CENTRA OFICEJO

Nieuwe Binnenweg 176

ROTTERDAM - 2 - NEDERLANDO

Ankaŭ por la UNIVERSALA KONGRESO oni direktu ĉiujn poŝtaĵojn al la K.K.S. JE LA SUPRA ADRESO



# Printempo



Ni kantu printempon, plej bela sezono!  
Ĝoje, kiel ĉiam alvenas al ni;  
El la kvar fratetoj — la jara kvarono  
De junec'ĉiama —, vere estas ĝi.

Printempo similas infanon kun ridoj  
Spontanaj, naivaj, plej puraj, sen fin';  
La suno, la floroj, kaj ankaŭ la birdoj,  
Per oro, parfumoj, kaj tril', festas ĝin.

Kun Marto, foriris, lastvintraj restaĵoj;  
Ardas nov-vivo kun gojo de April';  
Matene rozgutoj brilas sur herbaĵoj,  
Dum suno levigas, kaj grincas la gril'.

Fandigas la neĝo, kaj ĉesas malvarmo;  
Nur restas freŝeco; ĝojigas la sun',  
Flirtas papilioj, kaj estas, ja, ĉarmo  
La floroj aromaj, kaj brilo de lum.

Florado de Majo, mirinda naturo!  
Jam helpas la suno ekvivi burĝon';  
Saltas rivereto kun murmur-susuro,  
Kaj ĉio kantlaŭdas pri ĉarma sezono'.

M. de Elezcano  
(Bilbao)

## LA LEGANTOJ SKRIBAS

*Ni inaŭguras hodiaŭ ĉi tiun novan sektion de Boletín kaj ni esperas ke la legantoj akceptos kaj pliriĉigos ĝin per siaj sugestoj kaj leteroj.*

Moyá, la 5-an de marto 1961.

S-ro Redaktoro de *Boletín*,

Kara samideana amiko: En la lasta numero de nia karega «Bulteno» mi legas pri la laboroj faritaj de S-ro Rico kaj ankaŭ pri la propono de tiu samideano, okazigi nian Nacian Kongreson en Ceuta dum la jaro 1963.

Laŭ mia modesta opinio, la ideo estas tre bona kaj studinda. Ni jam vojaĝis al Málaga, al Pontevedra kaj, antaŭe, al Gijón; do, ni ankaŭ povus iri al Ceuta. Se ni konsideras ke la Kanariaj samideanoj ankaŭ ege deziras partopreni iun kongreson, eble la solvo estas la indikita ĉarma Ceuta.

Ni serĉu taŭgajn datojn, kaj la Kongreso en la menciita urbo bone sukcesos.

Korajn salutojn. Via:

*Ramón Molera*

ESPERANTOLOGIO Volumo II (p. 63-168). N.<sup>o</sup> 2 julio 1961. Red. Dro. Paul Neergaard, Ak., Kopenhago, Danlando.

Sendinte ĝian abonprezon, 300 pesetojn, al la hispana peranto, Sro. V. Hernández Llusera, Avda. Ejército Español, 59, Sabadell, la interesatoj tuj ricevos, rekomendite, la du aperintajn kajerojn.

Kio estis unua? Ĉu la ovo aŭ la kokino? Ĉu la organo kreas la funkcion aŭ, male, la funkcio la organon? Estas kurioze ke artefarita lingvo «simpla, klara, belsona, vere internacia en siaj elementoj» estas multŝpruca fonto de erudiciaĵoj, fluejo de nova, abunda, interesplena scienco; la Esperantologio, branĉo de pli ampleksa, vere reala scienco gravega: la Interlingvistiko.

Ĉu Zamenhof kreis tute simple la simplan lingvon, aŭ ĉu la lingvo simpla enkarniĝis en Zamenhof, kaj Zamenhof poste tiris tute simple el la profundo mistera de la scienco erudicia? Jen kurioza problemo, kiun solvas intense kaj agrable la tiel nomata neperioda revuo «ESPERANTOLOGIO», vere ĝojiga por la amanto de la tute serioza scienco de la artefaritaj lingvoj.

Estis ĉiam mia opinio —priridata de «seriozuloj— ke simpleca Esperanto estas pli «formiga», pli grave fruktodona pri edukado kaj utila instruado de abitrientoj ol la ĥaosa latino, kiu neniel praktike utilas por abitrientoj. Tia opinio ne estas senbaza, sed naskiĝinta de mia propra sperto ekde la studentaĝo, ĉar mi studis Esperanton antaŭ ol la latinon de la bakalaŭro; kaj poste mi spertis tion ankaŭ per miaj filoj, samcirkonstanc. La sola tiun opinionon pravas nun ĝisfunde de la tiam ekzisto de la fekunda esperantologio, tiom loga por scivolemuloj, kiom miriga por la cru-

diciuloj, kiuj tiras el ĥajna simplaĵo, tiom da sciencaj rezonoj, logikaj argumentoj, interesaj rilatoj, naturecaj ekzemploj, ke oni komprenas emocie la instrukapablon de Esperanto kaj ties internan impulson por vivado samranga kiel tiu de la naturaj lingvoj.

Tiu ĉi lasta kajero de ESPERANTOLOGIO entenas, kiel la antaŭaj, artikolojn multnombrajn pri la plej diversaj temoj planlingvaj, ĉiuj de eminentaj aŭtoroj. Ĝi la riĉa enhavo ni citu kiel ekzemplon, ĉar «por specimeno sufiĉas unu butono», nur kelkajn: «Inteplektitaj frazoj» de H. A. de Hoog; tre interesa studo pri detalo de ĝenerala gramatiko, kuriozaĵo analizinda en ĉiuj lingvoj kaj ne kutime traktata; «La waringhiena verbodivido», de Kalocsay; nova ideoplena grupigo de verboj kaj ties gramatikaj sekvoj; «Demokrateco ĉe vortelektio kaj vortderivado en lingvo internacia», de Paul Neergaard; firme argumentita defendo de la internacieco «populara» kaj simpla de Esperanto, super la aristokrata kaj komplika «natureco» de aliaj projektoj; «Ĉu Nepalo aŭ Nepalujo?», de nia klera viglulo J. Régulo Pérez, kiu jam alkiutimigis nin al siaj sciencaj firme bazitaj studoj filologiaj; kaj tiel plu, ĝis dek kvin diversaj studoj samgrade interesaj kiel la cititaj.

Krom tio, la kajero komenciĝas per io alia, kio ĝin briligas: omaĝo al Waringhien. Ĝi konsistas el priverkajoj de Kalocsay (poemo), de P. Neergaard, de E. Privat (franclingve), kaj laŭnature granda portreto de la eminenta meritegulo. Aŭkaŭ mian omaĝsaluton al Waringhien: vasta, profunda, intensa kaj plenscienca esperantologo.

ALFREDO VILLA Y VILLA

#### ATENTU, RECENZISTOJ

Ni urĝe petas al tiuj, kiuj ricevis librojn por recenzi, ke ili bonvolu sendi, kiel eble plej baldaŭ, la menditan recenzon por publikigo sur la paĝoj de **BOLETIN**. Antaŭdankon.

NOVA CIVITO. — Dumonata esperanta revuo. Redaktoro: Igino Giordani; Redakcio: Romo (Italujo). Via della Scrofa, 14. Jara abono: pesetoj 120. Hispana peranto: Gino Bonadimani, Av. República Argentina, 184-IV-2, Barcelona.

Jen nova revuo; ne nun esperantista revuo plia, sed revuo tute en Esperanto, kio estas alia afero.

Malgraŭ la kutimo «Nova Civito» probatalas ideologion; tamen, de diverstendencaj revuoj, ĝi ne atakas aliajn malsamajn penson kaj opiniojn, kio, ja, estas ŝatinda fakto ĉe la esperantistaro. Krome, ĝi, sendube, kontribuos al ekvibrado de la pesilo, kin, pro abundo de revuoj ĉe unu flanko, kliniĝas, foje, kun dangeŝaj sekvoj por la E-movado en kelkaj landoj.

La revuo «Nova Civito» estas modernaspekta, formato 31 x 24 cm., kun multaj fotoj kaj varia enhavo. El la diversaj temoj pritraktataj en la unua numero, kiun ni ricevis, ni menciis: «Kuracilo A», kie fratamo estas konsiderata kiel diagnoza kaj kuraca rimedo; «La Sankta Jando» kie oni priskribas viziton al la Sanktaj Lokoĵ, en Jeruzalemo; «Tiu-ĉi, nia planedo maljuna» kie oni komencas historion de l'universo; kaj aliaj ne malpli interesaj artikoloĵ.

K. R.

PRIVILEGIA VOJO AL LINGVOS IO: ESPERANTO, de Vilho SETALA.- Ilustrita de Asmo Alho kaj Kylli Koski. Eldonis, kunlabore, Fondumo Esperanto (Helsinki: kaj Universala Esperanto-Asocio (Rotterdam. —10 x 14'5 em., 128 pag., broŝurita.

Laŭ propagandilo, ĝi estas «Moderna libro por plenkreskuloj kaj infanoj, tute en Esperanto, kun multobligitaj instruĉioĵ en kelkaj lingvoj—inter ili, la hispana—se oni petas ĝin, mendante la libron».

Prezo: 2'50 guld. — 10 stoloĵ. Esperanto-instruantoĵ ricevos instruĉiojn en Esperanto.

Kiam oni lernas lingvon kaj oni opinias posedi ĝin, oni povas konstati ke la lornado de vortaro kaj gramatikaj reguloĵ tute ne sulĉas por flue paroli aŭ skribi ĝin. Mankas tiu facileco por uzi tiujn konojn, kaj ĝi venas al ni tre malrapide, kaj, multfoje, stumble.

La simpatia libreto de Vilho Setälä estas la alirebla ponto kiu kondukas de la seka kaj teoria kono al la kontentiga kaj praktika uzado de tiuj konoĵ. Riko kaj Keko kondukas vin, senstumble, sur la ponton, kaj, senpene, vi alvenas en la alian bordon, trovante facilan kaj uzebalan lingvon.

Eĉ bone bakitaj esperantistoj trovas plezuron entreprenante tiun vojaĝon!

Bone lernante ĝin oni posedas sufiĉan vortprovizon por legi romanojn, nur konsultante vortaron por 5 % de la enhavo: Ĝi estas kontentiga atingajo!

Ne estas, do, strange, ke la apero de tiu libreto vokis sinceran entuziasmon en la instruistaj medioĵ kaj, ankaŭ, ĉe la komencintoĵ.

Vilho Setälä, estas, do, varme gratulinda pro tiu utila kaj trafa libreto.

ROHO

Legu la filatelan revuon DER SAMMLER DIENST, organo por ĉia poŝtmark-kolektantoĵ.

Editoro: **KARL JHL & CIA.**  
Coburg - Germanlando  
Postfach 683


Mendu numeron kiel provon-Trimonata abono 4'40 DM aŭ 60 pesetoĵ.

## PARA NUESTRO BOLETIN

(Donativos recibidos desde el 1 al 31 de Diciembre de 1961)

	Pesetas
<i>Suma anterior</i> . . . . .	5.627
L. A. Ramírez (Huete) . . . . .	40
A. Guerrero (Zaragoza) . . . . .	20
J. Casanovas (Gerona) . . . . .	30
P. Masvidal (Bañolas) . . . . .	40
A. Jiménez (Castellón) . . . . .	25
M. Esteban (Zuera) . . . . .	10
J. Figueras (S. Esteban de Bas) . . . . .	40
<i>Total de 1961, pesetas</i> . . . . .	5.832

La sumo estas iom pli alta ol tiu de 1960. Koran dankon al ĉiu donacinto.



**Prelego de japana samideano, S-ro Yutuka Waseda.**

*Kliŝo sendita de R. Molera.*

## VOCABULARIOS

### Esperanto - Español

(85 Ptas.)

Y

### Español - Esperanto

(75 Ptas.)

del Dr. E. TUDELA FLORES

Pedidos al autor:  
RUZAFÁ, 45 - VALENCIA

## GRAMÁTICA, EJERCICIOS Y DICCIONARIO de ESPERANTO

por  
**JOSE ANGLADA PRIOR**

Edición ampliada  
164 páginas, 40 pesetas

Se ha hecho una tirada especial de la  
ampliación (Suplemento)  
**precio 12 pesetas**  
para atender a los que poseen la  
edición anterior

Gastos de envío aparte  
Pago anticipado o a reembolso

Pedidos a la FEDERACION  
o al autor

Sitjas, 3, pral. 1.<sup>a</sup> - BARCELONA. (1)

## CURSOS DE ESPERANTO por Correspondencia

de la

Federación Española de Esperanto

Calle Forn, n.º 19 MOYA (Barcelona)

Centro autorizado por el Ministerio de  
Educación Nacional, n.º 68